

N-ro 6/2005
16a jaro (2a periodo)



Kjære IND-leser!

Også denne gangen ble det mest *esperantaĵoj*, styret har så mye på hjertet... Og siden vi har altfor mye å gjøre med *esperantaĵoj*, juleforberedelser og eksamen, og antar dere er fed-up med julegreier, så ble det bare *esperantaĵoj*.

De viktigste nyhetene er at NJE vil subsidiere abonnement på blader, og at vi vil arrangere en aldri så liten vinterfest før jul!

Håper vi ses!

Til dere vi ikke ser;
god jul!

Signe



inter ni dirite

- LA JUNULARA FORUMO

Redaktis: Signe Christophersen

Vintra festo!

- **NJE havas la ĝojon** inviti la membrojn al festo ĉe nia kasisto, Leif Arne, en Løkkaskogen 5 B, en Oslo, sabaton la 17an de decembro je la 19a. Ni pensas ke estos agrabla vespero, ni planas vidi la faman, premiitan, norveg-esperantan filmon *Que sera, sera*, manĝi kaj trinki ion bonan, babili, aŭdi esperanto-muzikon... Do, venu! Se vi planas veni, bonvolu telefonu al Leif Arne je telefonnumero 414 06 719.

Ni deziras ke ĉiuj povu partopreni en la babilado, kaj pro tio ni verŝajne parolos norveglingve. Sed se iu ŝatus babili en Esperanto kun aliaj junuloj, vi kompreneble havas la eblecon!

Por tiuj el vi kiuj loĝas tro longe for de Oslo: Ni povas konsoli vin, ni planas aranĝi ian pli grandan kaj longdaŭran aranĝon venontjare, al kiu ni provos venigi membrojn de la tuta lando.

NJE relanĉas gazet-subvencion

- Antaŭ kelkaj jaroj NJE ofertis al siaj membroj pagi 50 procentojn de la kosto de unu eksterlanda gazeto. Nun ni relanĉas tiun oferton, kaj esperas ke multaj membroj uzas ĝin! NJE ankoraŭ pagas 50 procentojn de la prezo kaj eĉ, ekde nun, mendas ĝin por vi! Ĉiuj membroj povas ricevi la rabaton dum du jaroj. *Norvega Esperantisto* prezentas plurajn gazetojn ĉi-numere p. 17-21.

Internacia Seminario

Internacia Seminario (IS) finner i år sted i Xanten langt vest i Tyskland. IS, som er et av de største esperantoungdomsarrangementene med over 200 ungdommer fra mer enn 20 land, arrangeres av den tyske esperanto-ungdommen hvert år i dagene rundt nyttår. Årets tema er religion, kultur og livsfilosofi i det 21. århundre. Er det fortsatt behov for religion? Er man gammeldags hvis man tror på Gud, eller er selv ikke-tro helt antikvert? Hvorfor er det så mange forskjellige religioner, og i hvor stor grad er de allikevel like? Hva er forskjellen mellom kultur og religion, og hva betyr forskjellen i praksis? Hva med andre levemåter? Det blir selvfølgelig ikke bare alvor, men også moro: Nyttårsfest, diskotek, bar og rolig café.

Rapport fra fjorårets arrangement av Bjørn Bojesen kan leses i *Inter ni dirite* nr 1/2005.

Vi kan nevne at Uhlen-legatet i hvert fall tidligere har vært positive til å støtte ungdoms første reise på utenlandsk treff. Men ekstra gode muligheter for støtte er det nok hvis man er medlem i Oslo Esperanto-klubb og søker om støtte fra Kjell og Aase Gustavsens støttefond.

For flere opplysninger, se <http://www.esperanto.de/is/eo/2005/index>, eller kontakt oss på e-postadressen nje@esperanto.no

Nova vicprezidanto en NJE!

Ĉi-somere kiam estis landa kunveno de NJE, oni decidis peti la estraron elekti vicprezidanton. En la lasta estrarkunsido, finfine, ni havis la ĝojon enpreni tute novan kaj freŝan estraranon. Ĉi-tie Kristoffer Haug prezentas sin al vi:

Jeg bor for tiden på Sogn studentby i Oslo, og går andre året på bachelorprogrammet «Materialer og energi for fremtiden». I tillegg til å være nyvalgt nestleder i NJE er jeg også nestleder og kasserer i Studenta Esperanto-Societo. Jeg fikk for første gang høre om Esperanto da jeg gikk på videregående, og glad i realfag som jeg er ble jeg imponert av språkets enkelhet og logiske oppbygning. Jeg håper jeg kan være til hjelp i min nye stilling, med å bidra til å spre kunnskap om Esperanto.



Internacia Junulara Kongreso

Vi har også fått brev fra arrangørene av neste sommers IJK. Det som er skrevet om reisestøtte i avsnittet om Internacia Seminario gjelder her også.

SARAJEVO INVITAS...

Vi certe jam scias ke la 62-a IJK okazos inter la 6-a kaj la 13-a de aŭgusto 2006 en Sarajevo, Bosnio-Hercegovino.

Loka Kongresa Komitato elkore invitas junajn norvegajn Esperantistojn partopreni tiun ĉi eventon.

Espereble multaj membroj de la norvega movado, ne nur gejunuloj, rekonos la ŝancon viziti Sarajevo kaj samtempe partopreni IJK-n. Jen nova ebleco ĝui eksterordinaran kongresan etoson kaj profundigi bonajn rilatojn inter niaj movadoj.

La kunvivado de diversaj popoloj, religioj kaj kulturoj havas jam plurjarcentan tradicion en Sarajevo. Nek teruraj okazaĵoj dum lastaj dek jaroj malharmonigis la urbon. En la nuntempa malfermiĝo kaj akceptado de tutmondaj normoj, pro



sukcesa konservado de siaj kutimoj kaj la tradicia kunvivado de malsamaj religioj, kulturoj kaj etnoj, Sarajevo ŝajne estas la plej bona loko por diskuto pri la nuntempo, la tutmondiĝo kaj la konservado de tradicioj, multkultureco kaj toleremo.

Grandaj olimpikaj montaroj, fonto de la rivero Bosno, neolitika trovejo Butmir, riĉa nokta, kultura kaj arta vivo, bonega gastronomia oferto – ĉio troveblas nur duonhoron for de la kongresejo.

Por akurataj informoj pri la aliĝreguloj kaj la kongrespreparoj, bonvolu viziti nian retpaĝaron: www.esperanto.ba

Bonvenon en Sarajevo!

*Prezidantino de Loka Kongresa Komitato
Vildana Delali*

Recepto de vegana ŭoko

En tiuj ĉi ege kukaj kaj grasaj tempoj ni prezentas al vi recepton de tute vegana ŭoko. Postulas tre malmulte da tempo fari ĝin, ĝi estas bongusta, saniga, malmultekosta, kion pli vi povas atendi?

Por du personoj:

Kuiru tri decilitrojn da rizo.

Fajntranĉu du ajlerojn kaj unu kuleron da freŝa zingibro.

Tranĉu en maldikajn striojn unu paprikon, unu karoton, malgrandan poreon, du

ĉampinonoj, iom da tigobrasiko, sep foliojn da Pekina brasiko, iom da celerio. Ne gravas ĉu vi havas ĉion, uzu tion kion vi havas. Se vi deziras aldoni ion, faru tion.

Varmigu la legomojn – ne ĉiujn samtempe, ĉar devas esti malmulte samtempe – en oleo en varmega ŭoko, ĝis ili estas varmaj – ne plu, ili restu malmolaj.

Miksu la legomojn en la ŭoko, kaj aldonu sojsaŭcon. Lasu ĉion tie dum vi rapidege metas telerojn, glasojn kaj akvon sur la tablon.

Bonan apetiton!

NJE-listo

Mi pensas ke ni povas konstati ke ni fakte kapablis aktivigi la NJE-liston. Eĉ estiĝis interesaj kaj agrablaj diskutoj! Do, la tasko nun restas daŭre uzi ĝin! Se vi ankoraŭ ne aliĝis, vi povas fari tion en jena retpaĝo: <http://www.esperanto.no/mailman/listinfo/nje-listo>.

Venonta IND

La limdato por la venonta *Inter Ni Dirite* estas la 27a de januaro. Kontribuojn vi povas sendi al Aleksander Helgaker, lia retpoŝtadreso estas: aleksander.helgaker@gmail.com

— FINO DE *INTER NI DIRITE* —

Katalogo de artikoloj en Esperantaj revuoj

Pli ol 3 800 artikoloj el Esperanto-revuoj pri ĉiaj temoj estas nun registritaj en nia komputilo. Ili aperis en *El Popola Ĉinio*, *Heroldo*, *La Praktiko*, *Internacia Jura Revuo* kaj multaj aliaj kulturaj kaj fakaj revuoj, precipe en la 70aj kaj 80-aj jaroj, sed ankaŭ pli frue, eĉ ekde 1907. Ili estas registritaj per titolo, verkinto, kaj la nomo kaj numero de la koncerna revuo. La plej multaj el la artikoloj ricevis Dewey-numeron kaj ankaŭ estas registritaj ĉefaj lokoj kaj homoj menciitaj. Ekz-e:

Ĉinaj drogherboj, Wang Jia'en, *El Popola Ĉinio* 1983 5, p.8-10 : ilustr.

[Dewey] 615.3, [persono] Huo Riuxing, [loko] Ĉinio.

Smet, W.M.A. Kiusence la delfenoj estas inteligentaj?. – I: *Heroldo*. – (1969, n-ro 1471, p. 3 ; n-ro 1472, p. 3) [Dewey] 599.5

Oni povas serĉi artikolojn pri iu temo, ekz-e delfenoj, kaj tiam trovas ĉiujn artikolojn kiuj enhavas tiun vorton en la titolo. Aŭ oni povas uzi la Dewey-

numeron por serĉi ekz-e artikolojn pri drogoj.

Tiun projekton iniciatis fine de la 80-aj jaroj Tom Arbo Høeg, kiu mastrumis la bibliotekon de NEL, laŭmodele de simila registrado de artikoloj en norvegaj periodaĵoj farata en la tiama Universitata Biblioteko, kie li laboris. (Tiu norvega registrado estas nun daŭrigata en la poste fondita Nacia Biblioteko.) Kun kelkaj helpantoj en NEL li registris 1300 artikolojn komputile kaj pliajn 2500 surpapere ĝis li mortis en 1992. (Pliajn li nur markis per paperfiksiloj en revuoj.) Tiuj 2500 estas nun registritaj komputile, kaj estis mia espero trovi iun bibliotekon aŭ muzeon en eksterlando kiu pretus transpreni kaj ĝisdatigi la kolekton, sed pri tio mi ne sukcesis. Ŝajnas ke ankoraŭ neniu instituto komencis entrepreni similan ĝeneralan registradon (kvankam ie registriĝas artikoloj pri temoj Esperantaj aŭ interlingvistikaj). Ni devas konkludi ke Tom Arbo Høeg almenaŭ per 15 jaroj antaŭis sian epokon.

Douglas Draper